Forslag til vedtektsendring som skal behandles på landsmøtet, må være forbundsstyret i hende senest 1. mars samme år.

Endring i vedtektene kan bare skje på landsmøtet med 2/3 flertall.

Forslagets pgf. 20 (ny pgf. 21) ble enstemmig vedtatt.

Pgf. 21 Oppløsning

Oppløsning av forbundet må behandles av ett - eller om mulig to landsmøter i rekkefølge. Vedtak om oppløsning krever 3/4 flertall. Ved oppløsning bestemmer landsmøtet hvordan forbundets midler skal anvendes, slik at de kommer esperantobevegelsen til gode.

Forslagets pgf. 21 (ny pgf. 22) med endringer som innebærer at vedtektene skal foreligge på begge norske målformer og esperanto, men at bokmålsteksten skal være den grunnleggende, ble vedtatt med 43 stemmer, 1 avholdende.

Pgf. 22 Språk

Forbundets vedtekter skal finnes på begge de norske målformene og esperanto. Bokmålsteksten er den grunnleggende.

Hvert medlem skal motta et eksemplar av vedtektene.

8 Rapportering til styret i kommende periode

Landsmøtet tok straks stilling til antallet rapporter foreningene skal sende til forbundsstyret. 11 stemte for fortsatte kvartalsrapporter, 33 for halvårlig rapportering. De gamle rapporteringsskjemaene går ut av bruk.

9 Forhøyning av kontingent

a) Kontingentene indeksreguleres fortsatt.

b) Kontingenten økes med ca. 25 prosent.

Vanlig direkte medl.	kr 150	Husstandsmedl. begge kat.	kr 50
Klubbmedlem	kr 140	Ungdomd. husstandsmedl.	kr 20
Ungd. direkte medl.	kr 100	Livsvarig medlem	kr 2000
Ungd. klubb	kr 90	Livsvarig medl. over 60 år	kr 1000

Det ble vedtatt å gå bort fra betegnelsen "familiemedlem", og i stedet bruke betegnelsen "husstandsmedlem".

Vedtatt med 40 stemmer mot to, tre avholdende

10 Arbeidsplan

På grunn av knapp tid og utkjørte møtedeltakere gikk diskusjonen om arbeidsplanen ikke særlig dypt i materien. Det kom fram bemerkninger om at planen var preget av gode ønsker, men at den i liten grad forplikter styret.

Otto Prytz svarte på vegne av styret at planen som nå ble presentert landsmøtet, inneholder mange av de samme elementene som ved forrige landsmøte fordi dette var saker som ikke var løst. Han fryktet at det samme kom til å skje denne gangen også, delvis på grunn av kapasitetsproblemer. Ingen tok ordet for å kommentere styrets holdning til arbeidsplanen.

Til INTERNT ARBEID pkt. 2 vedtok landsmøtet å forplikte styret til å arrangere ett seminar for medlemmene hvert år i landsmøteperioden. Styret kan ta stilling til hva som bør være tema for disse seminarene og hvor og når de skal arrangeres, eller de kan delegere dette til en arbeidsgruppe.

Dette ble vedtatt med 29 stemmer mot sju. Ni avholdende.

Som nytt punkt, ble det vedtatt at styret skal sørge for å trykke opp nye vedtekter og få dem oversatt til nynorsk og esperanto.

UTADRETTET ARBEID

Punkt 1, som påpeker behovet for en markedsføringsekspert, ble vedtatt strøket med 17 mot 1 stemme. 20 avholdt seg fra å stemme.

Begrunnelsen var at det ikke har noen hensikt å engasjere konsulentbistand når vi selv ikke har klart for oss hvilke konkrete arbeidsoppgaver vi skal sette vedkommende til, og ikke helt vet hva vi konkret ønsker å oppnå ved hjelp av slik ekspertise.

Det ble påpekt at innhyret arbeidskapasitet krever klarhet i mål og bruk av midler. NEL har ikke klare nok delmål og planer for å oppfylle dem. Det ble også kommentert at forbundet heller aldri har diskutert noen strategi for å oppnå målsettingene i vedtektene.

Tillegg til punkt 5:

Forbundet skal ta initiativ til at medlemmene lokalt innen fylker og kommuner utnytter samarbeidsmulighetene gjennom vennskapskommuner i de baltiske land, og generelt være oppmerksom på språkproblemet i Norden.

Nytt punkt, uteglemt ved utarbeidelsen av planen:

Inspirert av informasjonskampanje på Nordstrand og Strømmen i 1992 vil styret i 1993 kjøre en pilotkampanje om informasjon, som skal munne ut i en landsomfattende kampanje i 1994.

11 Den språklige situasjonen i Norden

Per Johan Krogstie orienterte.

Bjørn Thuv forfattet i den forbindelse en resolusjon om dette. Den ble straks sendt pressen.

12 Valg

Leder	Per Johan Krogstie	Styremedlem	Pepita de Caspary
Nestleder	Otto Prytz	Styremedlem	Bjørn Thuv (ny)
Generalsekretær	Kjell Peder Hoff	Vara I	Jon Arne Holm (ny)
Sekretær	Bjørn Øyen (ny)	Vara II	Agnes Gram (ny)
Kasserer	Erling Killingbergtrø	Vara III	Cato Haugen (ny)

Revisorer: Olav Bjørnsrud Helge Knudsen

Representanter til styret for Rolf Uhlens legat:

Harald Rygg (personlig vara: Carl Støp-Bowitz)

Nils Utne (personlig vara: Kjell Gustavsen)

Valgkomité: Douglas Draper Elna Matland Carl Støp-Bowitz

Vara: Thor Magnus Carlsen

Alle valg var enstemmig.

12 Avslutning

Per Johan Krogstie og Otto Prytz takket for konstruktive forhandlinger og avsluttet den formelle delen av landsmøtet.

Ĉefaj decidoj de la landa kunveno

La proponita aldono al la celparagrafo (Norvega E-isto 2, p.13) estis akceptita.

La distriktoj (por kunlaboro inter najbaraj societoj) malaperas kiel formala strukturo.

La lokaj societoj sendu raportojn 2-foje jare (antaŭe 4-foje) al la estraro pri planataj kaj komencitaj agadoj.

La estraro sendadu siajn protokolojn al la lokaj societoj.

La kotizoj altiĝos per 25%. (Vd. N.E. n-ro 3, p.11).

El la proponita laborplano (N.E. 3, p.10) estas forigita punkto 1 pri konsilanto pri enmerkatingo, pro tio ke ni mem ne sufiĉe klare difinis taŭgajn celojn kaj taskojn por tiulo.

La propono malfondi la Eldonejon kiel akcian societion estis akceptita. Tio tamen apenaŭ havos praktikajn sekvojn por ties libroserva aŭ eldona funkcio.

Resolusjon fra landsmøtet

sendt til Nordisk Ministerråd

Norsk Esperanto-Forbund har under sitt landsmøte i Skjeberg 28.-31. mai 1993 drøftet språksituasjonen i Norden. Vi har fra gammelt av anslagsvis 23 forskjellige språk i Norden, riktignok noen med få brukere, men vi ønsker jo fri og feilfri kommunikasjon for alle. Til tross for store kulturelle og språklige forskjeller ønsker vi å samarbeide, og felles språk gir best forståelse. Dette viktige spørsmål om språklig samforståelse er ytterligere blitt aktualisert ved våre nye forbindelser med våre nære [naboer, de]* baltiske land - som selv har innbyrdes forskjellige språk.

Landsmøtet i Norsk Esperanto-Forbund henstiller til Nordisk Ministerråd å ta opp spørsmålet om innføring av det internasjonale fellesspråket esperanto som skolefag - slik Unesco oppfordrer til (Unescos generalforsamling 8.11.85**) - med Nordisk Språksekretariat og beslektede organer. Norsk

Esperanto-Forbund og v re esperanto-venner i de  vrige nordiske land, og i de baltiske land, vil innledningsvis kunne bist  med r d, kursvirksomhet p  universitets- og h gskoleniv  samt med l reb ker og annen litteratur.

Landsm tet minner om at millioner av mennesker over den ganske verden i over 100  r har brutt ned spr kgrenser, og vi h per vi ogs  i de nordiske land vil gripe denne mulighet til spr klig samforst else.

* Mangler i originalen. Skrivefeil? - Red.

** Feilaktig "86" i brevet - Red.

EN ESPERANTO

Kongresa rezolucio

sendita al Nordia Ministra Konsilio

Norvega Esperantista Ligo dum sia landa kongreso 28.-31. majo 1993 diskutis la lingvosituacion en Nordio. Delonge ekzistas laŭtakse 23 diversaj lingvoj en Nordio, kvankam kelkaj el ili havas nur malmultajn uzantojn, sed ni ja deziras liberan kaj seneraran komunikadon por ĉiuj. Malgraŭ grandaj kulturaj kaj lingvaj diferencoj ni deziras kunlaboradi, kaj komuna lingvo donas la plej bonan interkomprenon. Ĉi tiu grava demando pri lingva interkompreniĝo eĉ pli aktualiĝis pro niaj novaj rilatoj kun niaj proksimaj najbaroj, la baltaj landoj - kiuj mem havas reciproke malsimilajn lingvojn.

La landa kunveno de Norvega Esperantista Ligo petas Nordian Ministran Konsilion levi la demandon pri enkonduko de la internacia komuna lingvo Esperanto kiel lerneja fako - konforme al la instigo de Unesko (en ties ĝeneral kunveno 8.11.85) - kun Nordia Lingvosekretariato kaj parencaj organoj. Norvega Esperantista Ligo kaj niaj Esperanto-amikoj en la ceteraj nordiaj landoj, kaj en la baltaj landoj, povos enkonduke asisti per konsiloj, per kursagado je universitata kaj altlerneja nivelo kaj per lernolibroj kaj alia literaturo.

La landa kunveno memorigas ke milionoj da homoj tra la tuta mondo pli ol cent jarojn disrompas lingvajn barojn, kaj ni esperas ke ankaŭ ni en la nordiaj landoj ekprenos ĉi tiun eblon por lingva interkompreniĝo.

Elnorvegigis Red.

NEL: Estraraj novaĵoj

KONFERENCOJ DE ALIAJ

ORGANIZOJ:

En konferenco de la Nordia Asocio (Foreningen Norden) kaj la Nordia Konsilio aprile pri la principo de proksimeco reprezentis NEL-on Per Johan Krogstie.

En la generalakunveno de la UN-asocio (FN-sambandet) en aprilo reprezentis nin Pepita de Caspary.

Kaj en la landa kunveno de la Nordia Asocio junio reprezentis nin Bjørn Thuv (nova estrarano). Li informis al la partoprenantaro pri Esperanto, konstata nescion kaj misciion, sed poste multaj esprimis interesiĝon. Tamen la asocio principe subtenas fortigon de la skandinavaj lingvoj, ankaŭ en komunikado kun finnoj, islandanoj k.c., kio malaktualigas enkondukon de Esperanto.

Bjørn Thuv partoprenis ankaŭ nordian UN-kurson aŭguste. Tie oni rezervis al li tempon en la programo por prelegeti pri Esperanto. La kurso estis multekosta (2600 kr.) kaj la kaŭzo montriĝis esti 50 000-krona elspezo por tradukistoj pro la finnoj.

Tom Arbo Høeg, kiu mortis marte de la pasinta jaro, testamentis al NEL 15 000 kronojn.

La estraro instigas la membrojn sendi donac-abonojn de Norvega Esperantisto por triamondanoj.

Esperanto en radio/televideo

Ni memorigas:

Se vi aŭdas mencion pri Esperanto en radio aŭ televideo, bonvolu sendi precizajn detalojn: dato, tempo, daŭro, enhavo, programuloj - al la komisiito pri radio Elna Matland, Fløenbakken 41 D, 5009 Bergen. Antaŭdankon!

- kaj en gazetoj

Mencion de Esperanto en norvegaj gazetoj bv. raportu al la Gazetara Servo de NEL, ĉe Torstein Kvakland, Inge Krokanns vei 8, 7024 Trondheim.

PA NORSK

Husk å rapportere radio-programmer og avisartikler hvor esperanto nevnes, til de respektive ombudene!

Norvega kroniko

BERGEN

La Esperantoklubo de Bergen ekskursis en la Ĉielira Tago - tio estas tradicio. En bel-ega, sunbrila tago ni veturis al Askøy; tiu belega floranta insulo estas nun atingebla per grandega ponto, majstro-verko de inĝenieraj arto kaj kono. Granda travivaĵo! Sur Askøy ni rigardis vidindaĵojn: Herdla, fama loko kie dum la milito la germanoj provis konstrui flughavenon, kaj kie ankaŭ troviĝas la plej granda bieno de Hordaland, menciita jam de Snorre.

Idiliaj havenetoj, arboj, floroj kaj plantoj multvariaj, kaj rezervejo por birdoj.

En la somerdomo de Lilly Davanger ni povis ĝui absolute bongustan tagmanĝon: salmon i.a., poste kafon kun aldonaĵoj, dum ni ĝuis la sunbrilon kaj la amikecan etoson. Ankaŭ Esperantajn novaĵojn ni aŭskultis, kaj amuzajn memorojn de nia fama UK, kiun ni ankoraŭ ne forgesis! Sukcesa ekskursitaĝo.

Raportis Elna Matland

OSLO

Mardon la 24an de aŭgusto. May Andreassen, ĵus reveninte post la Kultura Esperanto-Festivalo en Kopenhago,

prezentis siajn travivaĵojn tie, kun bildaj kaj sonkaseda ilustraĵoj. La tritaga programo inkluzivis teatraĵojn (La Krizalido), kanzonojn (Kajto; Ĵak le Puil; Jomart kaj Nataŝa), novelojn (Sten Johansson), kabareton (Fraŭlino Barlaston) kaj prelegojn (Zofia Fornal; Eckhart Bick), kaj evidente estis pli ampleksa kaj varia ol en antaŭaj jaroj. Aliĝis eĉ duoble pli da homoj ol atendite: 129 el preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo.

DD

HAMAR

HEDMARK AKTIVAS!

De la klubo de Hamar ni aŭdis ke la radiokurso de Jon Rømmesmo estas dissendota de la lokaj radistacioj de Hamar, Elverum kaj Flisa ĉiun lundon ekde la unua de novembro, 17.45 - 18 h., kun ripeto la postan vendredon.

Simile devus okazi en ĉiu gubernio!

PÅ NORSK

Esperantokurs blir sendt på nærradiostasjoner i høst på Hamar, Elverum og Flisa.

Et eksempel til etterfølgelse for de andre fylkene!

Nekrologoj

BERGEN

LEONORA SIVERTSEN

En Bergen forpasis Leonora Sivertsen, unu el la lastaj tagoj en Majo.

Leonora estis multjara membro de la Esperantoklubo de Bergen. Ĝi startis lerni Esperanton en 1945.

Leonora havis multajn taskojn en nia klubo, dum multaj jaroj. Kune kun sia edzo - ili renkontiĝis en la esperantomovado, kaj estis ambaŭ aktivaj esperantistoj - ĝi partoprenis kaj enlandajn kaj internaciajn kongresojn.

Paco pri ĝia memoro!

Amikoj en la Esperantoklubo de Bergen.

NELLY BJØRGE NILSEN

Mortis en Anglio la 1an de Julio Nelly Børge Nilsen. Ĝi estis Bergenano, kiu post la morto de la edzo - John A. Nilsen - transloĝiĝis al Yorkshire en Anglio, kie jam ekloĝis la sola filino.

Dum la preskaŭ 30 jaroj tie ĝi bonfartis, konatojn ĝi jam havis tie - nome la esperantistojn en Bradford kaj ĉirkaŭaĵo. Tio certe helpis al ĝi rapide engliti en la novan medion. Nelly estis - kune kun la edzo - inter la fondintoj de la klubo en Bergen, kaj ĝi

ĉiam kun fervoro kaj fideleco partoprenis en la esperantista vivo en nia urbo. La edzo estis dum multaj jaroj la delegito, kaj Nelly volonte malfermis la hejmon por en- kaj eksterlandaj samideanoj.

Tiel fervora membro ĝi estis, ke ĝi - ĝis sia morto - apartenis al nia klubo, sendis donacojn por la Kristnasko, kiujn ni povis lotumi. Entute ĝi pensis pri la klubo en Bergen, kaj pri Norvega Esperantista Ligo, kiujn ĝi subtenis dum preskaŭ 60 jaroj.

Pacon al via memoro, Nelly.

Elna Matland

ODDA

ODDVARD ØVSTHUS

Mortis la 25an de aŭgusto Oddvard Øvsthus, Odda, 71-jara.

Oddvard estis dum pluraj jardekoj membro de la klubo en Odda kaj de NEL. Fidela membro, kiu ofte partoprenis la distriktajn kunvenojn de Okcidenta Distrikto, kaj ĉiam sentis amon al la Esperanta afero. Fervore li kunestis en la asista laboro dum la UK en Bergen.

Dankon pro via aparteno al nia movado, Oddvard, kaj pacon al via memoro.

Elna Matland

Seminarioj en Finnlando

Tampere 28.VI - 2. VII 1993

Jyväskylä 4. - 9.VII 1993

La Esperanto-Asocio de Finnlando invitis Odd Tangerud por fari la instruadon en la daŭriga kurso en TAMPERE, invito kiun li akceptis, kaj kun ĝuo atakis gramatikajn lernendaĵojn, kiujn li poste en la samaj lecionoj montris, kiel ili uziĝas en facilaj, sed literature altvaloraj tekstoj, nome kantoj, poemoj kaj mallongaj noveloj. Kiel instruisto li provis instigi la kursanojn al parolo kaj esprimo de opinioj, kio estas la plej malfacila tasko de instruisto. La kursanoj tamen ricevis eblecon uzi siajn voĉojn kantante kaj laŭtleĝante, kion ili tre volonte faris. Odd havas ja riĉan stokon da facilaj kantoj kaj rakontetoj por uzo en elementa kaj daŭriga instruado. Je la adiaŭo je la fino de la kurso kursanoj kaj administrantoj kore laŭdis la laboron de Odd. Du el la kursanoj, kiuj estas ĉiĉeronoj en Tampere kaj studas Esperanton por prepari sin al la Universala Kongreso, prezentis al li ege grandan bukedon da rozoj.

Same koran laŭdon ricevis Eva Farkas el Hungarujo, kiu gvidis la kurson por komencantoj. Sed ĉar la raportanto ne ĉeestis ĝsian kurson, li

povas nur diri, ke administrantoj kaj kursanoj estis kontentaj, kaj la materialo, kiun oni povis vidi dum la paŭzoj, atestis pri la zorge elpensita progreso en la instruado. ĜSi instruas laŭ la Cseh-metodo.

Estas bedaŭrinda stato, ke norvegoj ne partoprenis tiun bonan kurson en kiu regis tre bona amikeca etoso. La kurso okazis en la kombinita altlernejo por agrikulturo kaj mastrumado. Do ni estis kune la tutan tagon, kaj manĝis kune en la granda manĝejo de la altlernejo. En 1995 la Universala Kongreso de Esperanto prenos lokon en Tampere. Tial aranĝiĝos multaj kursoj en suda Finnlando por prepari homojn al tiu granda evento.

La Esperanto-Asocio de Finnlando, en kunlaboro kun la Universitato en Jyväskylä, aranĝis la 26-an Someran Studsemajnon en Jyväskylä. Al tiu semajno ili invitis Odd Tangerud por fari kvin prelegojn kaj gvidi la konversacian rondon. Odd parolis pri "Norvega Poezio", "Alf Prøysen - la mironklo en la radioprogramoj por infanoj", "La drama mondo de Henrik Ibsen", "La tragedio Ifigeneia en Aulis, de Evripides" kaj "La tragedio Anna

Christie de O'Neill". Ege streĉa estis la programo, sed Odd kapablis teni la intereson de la aŭskultantoj, kaj li mem parolis same vigle ĝis la fino. Neniam li antaŭe parolis al aŭskultantaro tiel avida pri literaturaj riĉaĵoj. Li ankaŭ spertis ege koran dankemon pro la formo de la prezentado de la programoj. Rekompence li ricevis inter aliaĵoj la poemaron "Kalevala".

Estas strange konstati, ke la norvega literaturo estas tiomgrade nekonata en Finnlando. Tial estas misia tasko por norvego konatigi ĝin en digestebla formo al niaj orientaj najbaroj. Laŭdindaj estas la du aranĝantoj kaj gvidantoj dum la tuta kurso, nome Terttu Tyynelä kaj Seija Kettunen. Ili parolas mirinde fluan Esperanton. Seija ankaŭ estas ĉiĉerono en Jyväskylä.

La kurson por komencantoj gvidis Mirja Latvala, kaj Eva Farkas gvidis la daŭrigan kurson. Ambaŭ rikoltis laŭdon por sia laboro. Eva Farkas ja faris kursojn dum multaj jaroj en multaj landoj.

En la vesperoj okazis diversaj programoj, kaj precipe estis ĉsatata la ekskurso al la somerdometo Kiviniemi kun saŭnado, naĝado, trinkaĵoj, kradrostado kaj muziko de kamparana teamo. Eĉ tiun ĉi semajnon mankis norvegoj.

Raportis: Odd

Aranĝoj en eksterlando

(Pliaj informoj en nia oficejo.)

- Internacia studumo pri kulturo, turismo kaj komerco 1. sept. - 31. majo. Tutjara studado ebligas akiri sciojn kaj praktikon necesajn por labori en turisma oficejo aŭ gvidi propran turisman aŭ komercan firmaon. "Monda turismo", Bydgoszcz.
- Internacia foiro de Esperanto-turismo, Bydgoszcz, Pollando, 25.-30. sept.
- As Vig, apud Horsens, Jutlando. 29.-31. oktobro. Ĉiujara aranĝo. Kursoj 5-nivele.
- Jubilea (90-jara) renkontiĝo de Esperanto-Ligo Berlin, 27.-28. novembro.
- 4.-7. decembro: Kataluna kongreso de Esperanto. Alcúdia, Majorko.
- 27. dec. 1993 - 3. januaro. 10a Internacia Festivalo por mezaĝuloj - kaj junaj familioj, kun aŭ sen infanoj, sed ankaŭ junuloj bonvenos. Sensenstein, 15 km oriente de Kassel, meze en Germanio. Kadra temo: La Esperanta literaturo.
- 27. dec. 1993 - 3. januaro. Internacia Seminario por junuloj en Neumünster (norda Germanio). Temo: Rilatoj inter ŝtatoj.

Norvegaj kursanoj en Karlskoga

En la E-kurso en Karlskoga en junio partoprenis ses norvegoj. Entute partoprenis 25 personoj la kurson. La partoprenantoj alvenis de Norvegio kaj Svedio, sed tamen, ni reprezentis 10 aŭ 11 naciojn, ĉar kelkaj estis rifuĝintoj loĝante en Svedio. En la grupo por progresantoj, kun 5 norvegoj, instruis Georgo Handzlik el Pollando. Krom instrui la lingvon, Georgo ankaŭ kantis multe. Li estas konata kiel Barbo sen Barbo, kaj li tre bone kaj kantas kaj ludas gitaron.

En la grupo de komencantoj instruis Lars Forsman, instruisto ĉe la lernejo. Lars multe laboras por informi pri nia lingvo kaj ideo, li estas granda idealisto kaj aktivulo.

Ke estas facile lerni Esper-

anton, ni spertis la lastan tagon. Dum la adiaŭa kunveno, Snorre el Oslo, partoprenanto en la komencanta grupo, dankis en la nomo de sia grupo. Kaj Snorre tiel bone parolis la lingvon, ke ni konstatis ke li, post nur ses tagoj, ne plu estas komencanto, sed jam komencinto.

Dum la vesperoj, Georgo kantigis nin kaj prelegetis pri Zamenhof; estis ankaŭ norvega vespero, festo kaj i.a. spektado de vidbendoj.

La restado en la lernejo estis tre bona, kaj mi volas rekomendi kaj la somerkursojn kaj la 8-semajnajn kursojn aŭtune kaj printempe. Ĉi-jare oni aranĝos kursojn: por komencantoj 23.8 - 15.10, por progresintoj 25.10 - 21.12. Adreso: Karlskoga Folkhögskola, box 192, S-691 24 Karlskoga.

Ingebjørg Rambjør

"Pasporta servo"

Aperis la 1993-eldono de la internacia tranokta adresaro. Ĉi-jare ĝi enhavas 906 adresojn en 72 landoj. La nombro de landoj konsiderinde pligrandiĝis, kio ŝuldiĝas ne nur al la apero de multaj novaj landoj sur la mapo en orienta Eŭropa: Pluraj

afrikaj kaj aziaj landoj estas nun reprezentataj por la unua fojo. Kvankam la servon iniciatis kaj administras TEJO, iu ajn aĉetinte la libron rajtas per ĝi tranoktadi senpage. Ankaŭ troviĝas gastigantoj mez- kaj pliaĝaj.

Slovakaj naturprotektantoj vizitis Norvegion

De la Esperanto-centro en Poprad en Slovakio ni ricevis la jenan dankleteron:

Kvardek naturprotektantoj el Slovakio vizitis Norvegion kun celo konatiĝi kun la preparlaboroj por la Vintraj Olimpikaj Ludoj '94. Parto de la grupo estis esperantistoj, kiuj faris la unuajn kontaktojn por realigi tiun ĉi interesan ekspedicion.

Nome de la jam reveninta grupo dankas Milan Zvara, direktoro de ESPERANTO-CENTRO en Slovakia Poprad, al gesinjoroj Per Johan Krogstie el Hamar, Torstein Kvakland el Trondheim kaj Ester Olsen el Korgen - por prizorgado de loĝejoj, gvidado, informoj, sinoferemo kaj agrabla

akcepto. Sen ilia helpo la ekspedicio ne povus esti tiel sukcesa, kiel ĝi estis. Lillehammer, Mo i Rana, Svartisen, Bodø, la norda cirklo kaj multaj aliaj vizititaj lokoj postlasis neforgeseblajn impresojn, kaj praktika helpo de Esperanto ekigis intereson pri nia lingvo ĉe la neesperantista parto de la grupo.

Ĉiuj vojaĝemaj esperantistoj el Norvegio estas invitataj al Slovakio. ESPERANTO-CENTRO volonte akceptos vin kaj tieaj laborantoj klopodos pli-agrabligi vian restadon.

Ĝis revido en Poprad!

Kun saluto

Katarína Bodnárová

Korespondemuloj

Daure alvenadas en la oficejon leteroj de korespondemuloj eksterlandaj, i.a. el Pollando kaj aliaj orienteuropeaj landoj. Ĉu vi interesiĝas respondi tian? Bv. skribi al la oficejo, indikante kun kiuj landoj vi ĉsatus korespondi, ĉu vi volas korespondi kun inoj au malinoj, kaj la preferatan aĝon. Tiam ni sendos al vi unu-du leterojn kiujn vi povos respondi. Au, se vi

estas en Oslo, venu rigardi nian kolekton.

Al niaj eksterlandaj legantoj ni tamen devas emfazi, ke estas malfacile trovi korespondemulojn ĉi-lande, kaj ke ni bedaŭrinde ne povas garanti, ke vi ricevos respondon.

PA NORSK

Skriv til kontoret om hva slags folk du vil skrive med (land, alder, kjønn), og vi sender deg et brev eller to som du kan besvare.

Grandioza terminara projekto

De Rüdiger Eichholz (Kanado), la kompilinto de la impona Esperanta Bildvortaro, ni ricevis kajeron priparolantan lian projekton: PerKomputora Terminokolekto. (Tiun nomon li mallongigis al PeKoTeKo - konfuzige, ĉar ĝi tute ne temas pri pekoj.)

En sia nuna formo la kolekto ampleksas por ĉiu termino unu aŭ plurajn proponatajn vortojn en Esperanto, la uzatajn esprimojn en la angla, germana kaj la franca, UDC (Dewey-) numeron, kaj eventualajn rimarkigojn. Temas pri ĉiutagaj neologismoj, kaj teknikaj esprimoj. Ĝi estas eldonita surpapere en tri volumoj ampleksantaj preskaŭ 2000 paĝojn, sub titolo "Plena PeKoTeKo 1985-1990", kaj aĉeteblas por 80 usonaj dolaroj (= ĉ. 600 kr. kun afranko) aŭ en diskeda formo por la duono de tiu prezo.

Lia granda projekto por la estonteco estas kompakta (codoroma - CD-ROM) disko (kiu povas enteni la 500-oblon de ordinara densa malmola disko). Tiu kompakta disko enhavu tradukojn en

multaj lingvoj, tiel ke ĝi funkciu kiel multlingva traduka vortaro. Por povi uzi tian kompaktan diskon oni bezonas aldonan aparaton - t.n. "drajvon" - por sia komputilo (Eichholz preferas diri "komputoro") kaj Eichholz proponas ke vendistoj de tiaj drajvoj disponu la vortaran kompaktan diskon kiel reklamilan kunvendaĵon. Tamen nur postaĉete la uzanto malkovros ke la precizigaj difinoj estas en Esperanto, sed relative facile lernetos la lingvon sufiĉe por kompren(et?)i ilin.

La kompilado de la terminaro por tiu disko postulas grandegan laboron, sed ĝin povos dividi e-istoj tra la mondo. Kaj tiuj multe profitos el la laboro, ĉar ili ricevos multe pli da registraĵoj ol ili mem registros.

Do jen la baza ideo. Pli detale vi provos legi pri ĝi en la artikolaro, kiun ni ankaŭ ricevis en formo de du sonkasedoj. La plej aktualajn paĝojn ni pretas sendi fotokopie al vi kontraŭ pago de 5 kr., ekz. poŝtmarke.

La biblioteko de NEL en Hamar

En junio ni translokis la unuajn ekzemplerojn de niaj libroj kaj revuoj al Hamar (bibliotekisto: Bjørn Carlsen, Joh. Hirsch gt. 6F, 2300 H.).

La duajn ekzemplerojn ni stokas en Oslo (Esperantonia - Olaf Schous vei), kaj la triajn ni sendis al la klubo de Bergen.

Botaniko ĉe Bosporo

En la latina lingvo la bovo nomiĝas bos, kies genitivo estas bovis: Vi rekonas la radikon de la Esperanta vorto. En la helena la vorto estas bous, genitiva boos. Tio estas la unua elemento en la geografia nomo Bosporo.

La dua estas, do, por aŭ, pli ĝuste, póros, kiu signifas "pasejo tra rivero". La vorto estas la sama, kiun ni retrovas kiel ford en la angla lingvo kaj Furt en la germana. Do Oxford kaj Ochsenfurt ambaŭ signifas Bosporo, same kiel la norvega Øksnevad: "rivera travadejo por bovoj"! Parenca estas ankaŭ la vortoj port: haveno en la angla, kaj la norvega fjord = fjordo.

Sed ni reiru al la bovo! La

Esperanta verbo, kiu signifas "konduki brutojn sur kampo, por ke ili manĝu herbon" (PIV) estas en la latina pascere, kaj la persono, kiu kondukas la brutojn, estas pastor. Surbaze de la kristana bildo pri la "ĉsaf-oj" la vorto pastor kompreneble ricevis ankaŭ la signifon "pastro", kiu, cetere, estas la sama vorto.

En la helena lingvo la verbo pacere estas bosko (= mi kondukas la brutojn ...), kaj tio, kion sur la kampo manĝas la bestoj, estas botáne.

Post tiaj klarigoj oni komprenas, kial la scienco pri la plantoj nomiĝas botaniko, ĉu ne?

JHR

"Heroldo": Senpaga kongresa numero

La redakcio de "Heroldo" informas, ke la duobla aŭtuna numero, kun detala ilustrita raporto pri la Universala Kongreso en Valencio, estos ekspedata senpage al ĉiu, kiu petos ĝin per simpla poŝtkarto al la redakcia adreso: "Heroldo de Esperanto", Via Sandre 15, I-10078 Venaria Reale (Torino), Italia.

Al la aĉetintoj de rusaj libroj

Montriĝas ke la "afero" iom daŭras, ankoraŭ la eldonintoj en Moskvo ne sukcesis ekspedi la librojn kiujn vi mendis kaj pagis (tra mi). Mi denove skribis al ili, kaj forte esperas ke la libroj tre baldaŭ alvenos al vi.

Salutas Elna Matland
(Bergen, 15.8.93)

En la vendobreto

Novaj libroj en la vendobreto de la Eldonejo:

Muminvalo, de Tove Jansson. Trad. Eckhard Bick. Nova eldono kun plibonigita traduko kaj pli bele presita.

Edwin de Kock: Vojaĝoj kaj aliaj poemoj. Flandra Esperanto-Ligo, Serio Stafeto, 1992. 150 p.

Boris Kolker: Vojaĝo en Esperanto-lando, perfektiga kurso de Esperanto. Moskvo 1992, 340 p. ĉ 100 kr.

Pasporta Servo 1993. 900 adresoj en 72 landoj. 90 kr.

Ordbok svenska-esperanto. Ebbe Vilborg. Malmö 1992. Bindita. 478 p. (vd. cetere E-nytt 1/92, p.2)

Kaj ni memorigas pri:

la anekdotaro "Penetre tra jarcentoj", kiun ni ricevis grandstoke de Estonio kaj vendas por po 25 kr.

Unumane, romano de Johan Hammond Rosbach, 125 p. 80 kr.

Silka kuseno, novelaro de Johan Hammond Rosbach, 1991, 64 p. 55 kr.

Ludkartaro: "Ludi kaj lerni" 20 kr.

Kasedoj: Folioj de nia memoro (Ĵomart kaj Nataĝsa), 95 kr. Kajto (kun tekstkajereto) 86 kr.

Unuekzemplere ricevitaj

Vortareto Esperanto-neo-norvega. Odd Tangerud kaj Jon Rømmesmo. 20 p. ĉ 380 vortoj. Eldonis Jon Rømmesmo, 3530 Røyse.

Antologio de la moderna bosnia-hercegovina novelo. 1989. 178 p.

Astrid Lindgren: Emilo en Smolando (orig. "Emil i Lönneberga). Trad. Harold Brown kaj Kerstin Rohdin, lingve kontrolis Ebbe Vilborg. Motala 1993.